

BULTENO

de GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung deutscher
Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk



Fondita 1952

Numero 2

Marto/Aprilo 1975




Villach kiel internacia banloko

Gardata per la Karavankoj, la Karniaj-kaj Juliaj Alpoj, de la Altaj-Taŭroj kaj la Nokmontaro la urbo havas tre agrablan klimaton. La juniganta sanigforto de la termobanejo Warmbad Villach jam de post pratempoj estas konata. Dankŝtonoj al la fontodioj pruvas almenaŭ 2000-jaran uzadon de la termoj de Villach. La nova, rekte super la fontoj konstruita termo-

La plej gravaj varmaj lagoj de Karintio pro la centra situo de la urbo estas facile atingeblaj sur bonaj stratoj kaj helpo de densa trafikreto.

TRILANDANGULO

„Aŭstrio — Italio — Jugoslavio“



La termo banejo

halbanejo estas plene klimatita, kaj la kuracinstalaĵoj kontentigas la plej altajn postulojn. Menciinde estas ankaŭ, ke la konata kuracisto kaj naturesploristo de la mezepoko, Theophrastus Bombast von Hohenheim, nomata PARACELSUS, en sia fama „Libro de banejoj“ priskribas la sanigajn fortojn de la termoj. Lia patro estis dum jaroj urba kuracisto en Villach. Pro tio ĉi tiu urbo estas rigardata lia dua hejmurbo.

Supre de ARNOLDSTEIN en alteco de 1509 m troviĝas la trilandangulo. Grava punkto en Eŭropo, konsidere, ke ĉi tie ne nur allimas simple tri landoj, sed tri grandaj eŭropaj kulturpopoloj. Nome la germanoj, romanoj kaj slavoĵ. Ĝi situas en pitoreska, montara regiono kaj prezentas ankaŭ belegan perspektivon al la fame konataj karintiaj lagoj. Pro la proksimeco de la Adriatiko (80 km) regas tre agrabla, sunriĉa klimato kun multe da neĝo dumvintre. Pro tio oni kreis lastjare modernan skisportejon kun unu el la plej grandiozaj skiejoj de Eŭropo. Vintre kaj somere funkcias seĝlifto, kiu estas atingebla de la fervojstacidomo post 20 minuta promonado. La veturado daŭras 19 minutojn kaj post denove 30 minuta promonado oni atingas la trilandangulon. Dumvoje oni povas ĝui restadon en allogaj montargastejoj. Entute vere ŝatata ekskurso. Ne estas hazarde, ke LKK de la 27-a IFEF-kongreso elektis tiun ĉi lokon. Ja temas pri predestinita, internacie elstara regiono. Por demonstri tiun ĉi faktan oni inaŭguros ĉi-okaze en Arnoldstein „Esperanto-straton“, kiu gvidas

tra fervojista loĝkvartalo. Per ĝi — unu foje pli — efektiviĝos nia devizo:
„Fervojoj ligas la landojn,
Esperanto la popolojn.“
Do, koran bonvenon en la Trilandangulo!
M. Stuppniĝ

Mitteilung des Vorstandes

Vorstand, Bezirksbeauftragte und Beauftragte für Sonderaufgaben trafen sich am 15. 3. 1975 zu einer GEFA-Arbeits-sitzung in Frankfurt/Main. Unter dem Aspekt der uns vom BSW auferlegten äußersten Sparsamkeit wurde als wichtigster Punkt der Tagesordnung die aus organisatorischen Gründen empfohlene Verlegung des Tagungsortes der dies-jährigen Jahreshauptversammlung von Garmisch-Partenkirchen nach Treuchtlingen eingehend besprochen. Ebenfalls wurde die GEFA-Vertretung beim IFEF-Kongreß abgestimmt und die Stellungnahme unseres Landesverbandes zu den Programmpunkten der verschiedenen Ausschußsitzungen erörtert.

Das in den vergangenen Jahren als Bulteno Nr. 3 veröffentlichte Sonder-Bulteno in deutscher Sprache in einer Auflagenhöhe von 18 000 Stück wird aus Gründen der verkürzten Mittelzuweisung 1975 voraussichtlich nicht erscheinen können. Der besondere Wert, der bei den IFEF-Kongressen gebotenen Fachvorträge, wird von den offiziellen Stellen anerkannt. Die Nachfrage hat nicht unbeträchtlich zugenommen.

Werbung neuer Mitglieder, Information und Öffnung nach außen waren die Themen, zu denen von den Bezirks-beauftragten brauchbare Vorschläge geliefert wurden.

Die Auswirkung der Organisations-änderungen in der Mittelinstanz haben auch auf unsere Vereinigung weitere Folgen gehabt. Die Bezirks-beauftragten der aufgelösten Bundesbahndirektionen haben z.T. neue Aufgaben im GEFA-Vorstand übernommen. Weitere Veränderungen stehen bevor. Nach Neubildung des Sprach-Prüfungsausschusses, der in Bamberg bereits seine Aufgaben erfüllt hat, wird auch den Interessenten in diesem Jahr die Möglichkeit geboten, ihre Fähigkeiten vor diesem Gremium und der Öffentlichkeit (mündlicher Teil) unter Beweis zu stellen.

Für den Internationalen Esperantokongreß in Kopenhagen ist wiederum — wie in Hamburg — ein „Tag des Eisenbahners“ am Montag (28. 7. 1975) vorgesehen. Hierzu ergeht noch besondere Einladung. 1975 sollen wiederum Treffen unserer Esperanto-Pensionäre durchgeführt werden. Für den nördlichen Teil ist Osnabrück, für den südlichen Teil Treuchtlingen am 10. Oktober, vorgesehen. Die Jahreshauptversammlung 1976 wird wahrscheinlich vom 8. bis 10. Oktober in Paderborn (BD Essen) stattfinden.

Graß

LES — 1975

La Linza Esperanto-Skisemajno okazis de la 8a — 15a de Februaro denove sur la montara domo Strussing super Werfenweng/Aŭstrio. Ĝin partoprenis 54 personoj el Aŭstrio kaj Germanio, kiuj denove ĝuis la unikan atmosferon. Fervore kunagis 8 infanoj, ne nur sur neĝa kampo, sed ankaŭ ĉe aliaj okazoj. Niaj geamikoj Johano Geroldinger kaj edzino Melitta havigis al ni la senton, ke ni estas unu granda familio. La programeroj kiel ĉiam estis variaj, la pokaloj abundaj, la vetero belega, la neĝo amasa kaj la etoso plenharmonia.

Jam antaŭ unu jaro Johano Geroldinger akcentis, ke LES 75 okazu la lastan fojon en la ĝisnuna formo, pro tio ĉiu el ni respektis tiun deziron denove esprimi-tan, des pli, ĉar en Majo 1975 Aŭstrio gastigos la IFEF-kongreson ... — Ni interkonsentis, ke LES en la venontaj jaroj estu nura amika renkontiĝo (1976 de la 14a — 21a de Februaro), sed sen antaŭpreparita programo kaj sen disdono de pokaloj.

Kun dankemo en la koro ni adiaŭis de la simpatia geedza paro, kiu tiel longe sian tutan forton kaj libertempon malavare disponigis por IFES kaj por LES kaj ni estas konvinkitaj, ke ambaŭ restos la animo de la estontaj renkontiĝoj.

Tri el la germanaj gepartoprenintoj daŭrigis la vojaĝon al la 16a IFES en Plan Val Gardena/Italio. Detalan raporton pri tiu aranĝo vi povas legi en la „Internacia Fervojisto“.

Elisabeth Ritterspach

GEFA-jarkunveno

ne en Garmisch, sed en Treuchtlingen

La konata situacio ĉe DB kaŭzis, ke BSW petis nin, okazigi la jarkunvenon kvankam en distrikto Munkeno, tamen kiel eble plej norde. Ni trovis en Treuchtlingen (420 m alta) agrablan urbeton, kiu ja ne ofertas al ni altajn alpojn, sed tre ĉarman arbaro- kaj montetoriĉan ĉirkaŭaĵon kaj ĉiusepecan helpon flanke de siaj instancoj. Oni eĉ povas kun bona konscienco rekomendi, plani kelkajn feriotagojn post la kunveno en tiu regiono, kiu krome havas la avantaĝon, ke ĝiaj gastronomoj prezentas nekutime malaltajn prezojn.

Tra Treuchtlingen, kiu situas ĉe la grava fervoja nodo de la linioj Nürnberg — Augsburg — München kaj Würzburg — Ingolstadt — München, fluas la rivero Altmühl, kies plej interesa parto komen- ciĝas apud Treuchtlingen (ĝis la enfluejo en la Danubon), kaj kie en la regiono de Solnhofen oni gajnas la konatajn kalkplatojn por litografio. En tiea muzeo, unika en la mondo, ni vidos ŝtoniĝintajn marbestojn el la tempo antaŭ 150 milionoj da jaroj.

La dato de la jarkunveno estos la sama kiel jam anoncite, nome 10a ĝis 12a de Oktobro 1975.

Gießner

Sprachprüfungen

Am 11. und 12. Oktober 1975 besteht Gelegenheit, während der Jahres- versammlung in Treuchtlingen die einfache Sprachprüfung in Esperanto abzulegen. Interessenten werden gebeten, sich um- gehend mit dem Leiter des Prüfungs- ausschusses, Herrn Fritz Lautenbach, 64 Fulda, Am Abtstor 21 (Dienstanschrift: Betriebsamt Fulda), wegen der Anmeldung und näherer Einzelheiten in Verbindung zu setzen.

Der Vorstand

Nova varbroŝuro de GEJ

Germana Esperanto-Junularo eldonis en 10 000 ekzempleroj varbroŝuron sub la titolo „Wir informieren“ (Ni informas). Sur la dekdu paĝoj troviĝas 9 bildoj kaj koncizaj tekstoj pri la celo de Esperanto kaj Germana Esperanto-Junularo. La broŝuro estas destinita varbi novajn interesulojn kaj membrojn. Ĝin povas uzi ankaŭ lokaj grupoj kaj unuopaj aktivuloj en sia verba agado. La prezo por 1 ekzemplero estas —,10 GM. Mendu ĉe: Deutsche Esperanto- Jugend, 6731 St. Martin, Maikammer — Straße 21.

Japana geedza paro vizitas sian korespondanton en Hannover

Sinjoro Osaki-Kazuo el Takamatsu-ŝi, tradukinto de la fama japana novelo „KAIJIN-MARU“, partoprenis la 59an Universalan Kongreson en Hamburgo esperante, ke li renkontos tie sian korespondanton s-ro R. Wluka. Ili neniam antaŭe estis vidintaj unu la alian. Sed renkontiĝo sen rendevuo - malfacila afero! — Tamen, sur la teraso de la kongresejo s-ro Wluka subite tiretis mian manikon — jen s-ro Osaki-Kazuo kun edzino! Sendube, la fotografo ne trompis! Kia hazardo! Unufoje ili reciproke premis al si la manojn. Tuj post tiu feliĉega interkoniĝo li invitis nin al la apuda hotelo por daŭrigi nian interparoladon. Estis vere agrabla horeto en amika rondo. Memore al tiu unua persona kontakto kaj komuna kunesto en la 59a UK en Hamburgo s-ro Osaki-Kazuo dediĉis al ni po unu ekzempleron de sia leginda tradukaĵo „KAIJIN-MARU“.

Dum iu kongresa tago la amikoj el la Fora Oriento forlasis Hamburgon por sekvi inviton al Hannover. Ili estis gastoj de familo Wluka. Post komuna tagmanĝo la amikoj trovis enrigardon en germanan loĝejon kaj sin detale informis pri moroj kaj kutimoj ĉi-tieaj. Ili estis profunde impresitaj pri la germana privata kuirarto, loĝkulturo kaj mastrumado.

Malgraŭ la limigita tempo ni kune kun la gastigantoj ekskursis al diversaj vidindaĵoj, i. a. al la famaj Reĝaj Ĝardenoj de Herrenhausen, rigardis la internon de la urbodomo kun modeloj el diversaj epokoj kaj frapis ilian atenton pri la postmilitaj ruinaĵoj kaj nuntempa moderne rekonstruita urbocentro.

El la birdoperspektivo de la urbodoma turo niaj gastoj rigardis la urbon en ĝia tuta amplekso kaj ĝuis grandiozan panoramon.

Post refreŝiga taso da teo ni ekmarŝis al la stacidomo. Estis plezuro por ni gvidi tra Hannover bonajn amikojn, kiuj neniam estis en Germanio escepte de Hamburgo, despli ĝojiga por s-ro Wluka, ĉar li havis sian korespondanton en Hannover.

Ĉe la vagonaro ni bonhumore adiaŭis, sed ne por longa tempo, ĉar jam en la sekva tago ni kongresis plu en Hamburgo.

F. Busse

Rimarko: KAIJIN-MARU = nomo de ŝipo.

Botschafter Harry verließ Bonn

Der australische Botschafter in Bonn, Ralph Harry, ein bekannter Esperantist, hat am 6. Februar 1975 Bonn verlassen und wird künftig sein Land bei den Vereinten Nationen in New York vertreten. Aus einem Schreiben, das der Botschafter an den Präsidenten des Deutschen Esperanto-Bundes gerichtet hat, hier einige Worte: „Ich möchte ... allen Mitgliedern ... danken, die mich in Ihren schönen und geschichtsträchtigen Städten so herzlich betreut haben. Durch Esperanto habe ich Freunde nicht nur in Bonn, in Berlin, in München und in den anderen Hauptstädten der Bundesstaaten gefunden, sondern auch in Eschweiler und Hagen, Braunschweig und Koblenz, Offenbach



Botschafter Ralph Harry verabschiedet sich von Erhard Herlitze (Bba der BD Köln)

und Zweibrücken und anderen Städten.“ Zu einem Abschiedsempfang in Bonn hatte der Botschafter auch den Bezirksbeauftragten für Esperanto im Direktionsbezirk Köln, Erhard Herlitze, eingeladen. Dieser übergab dem Botschafter im Namen der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten, zu der Ralph Harry sehr freundschaftliche Beziehungen unterhalten hatte, einen Brief, dessen Inhalt wir hier auszugsweise veröffentlichen:
„... es genügen wenige Worte, um Ihnen einfach zu sagen, daß Sie während Ihrer ‚deutschen Zeit‘ unser Freund geworden sind. Nicht so schnell findet sich ein Diplomat, der durch seine beispielhafte Bescheidenheit und freundschaftliche Haltung dieses Urteil aus dem Munde von Einwohnern des Landes verdient, in dem er akkreditiert ist.

Sie können versichert sein, daß wir alle, die wir von Geburt an eine andere Muttersprache sprechen als Sie und trotzdem mittels einer gemeinsamen Sprache immer familiär und vertraut mit Ihnen zusammensein konnten, von ganzem Herzen und für immer Ihre deutschen Freunde bleiben werden.
Gießner“

Aus den Gruppen

Essen

Auf Veranlassung unseres langjährigen aktiven GEFA-Mitgliedes Josef Ballo, 433 Mülheim-Ruhr Broich, übersandte die Stadt Mülheim/Ruhr dem Bürgermeister der Partnerstadt Tours/Frankreich eine Grußadresse, die aus Anlaß des dortigen Esperanto-Kongresses vom 28. bis 31.3.75 von Josef Ballo im Original und in einer Esperanto-Übersetzung überreicht wurde. Außerdem überreichte unser Mitglied einen Bildband der Stadt Mülheim/Ruhr an die veranstaltende Esperanto-Gruppe der Stadt Tours, der er schon seit vielen Jahren freundschaftlich verbunden ist.

Köln/Wuppertal/Essen

Zamenhof-festo kaj GEFA-distriktjarkunveno en Opladen

Dimanĉon, la 15an de Decembro 1974, okazis la BSW-kantino de Opladen la fervojista Zamenhof-festo por la regiono inter Bonn kaj Dortmund. Ĉar la fervoja direkcia Wuppertal ne plu ekzistas kaj la tieaj ges-anoj nun apartenas al la fervoja direkcia Köln, direkcia delegito Herlitze povis saluti multnombrajn kunvenintojn. Li transprenis je tiu okazo la tradician taskon de nia redaktoro Graß, kiu antaŭe estis la direkcia delegito de Wuppertal. Sinjoro Graß dankis al la iamaj distriktmembroj kaj petis, ke ili en la novaj distriktoj same kunlaboru. Sinjoro Barnickel el Frankfurt/Main montris sonfilmojn pri la IFEF-kongreso en Tarragona kaj pri ŝipvojaĝo tra la Mediteraneo. Senpaga tombolo el donacoj de la kunvenintoj ĝojigis ĉiujn. Familio Kopietz el Opladen, geedzoj Herlitze el Bonn, Mesters el Rheydt kaj Schindler el Schwelm zorgis por manĝaĵoj,

trinkaĵoj, servado, por la libro- kaj inform-stando kaj organizado. Ĉiuj 4 edzinoj donacis membakitajn kukojn kaj torton kaj vendis ilin al la partoprenintoj. La enspezojn, la trinkmonon, la gajnon el amerikana aŭkcio de aliaj donacoj kaj libervolajn mondonacojn de la ĉeestintoj oni sendis al sinjoro Behrmann kiel helpon por la disvastigo de Esperanto, entute 110 DM.

Post la oficiala parto la junuloj kaj tiuj, kiuj sentis sin sufiĉe junaj, restis kaj dancis ĝis la 21a.

Schindler

Nova Distrikt-komisiito en Frankfurt/Main

Dum 23 jaroj d-ro **Wilhelm Lang** estis komisiito por Esperanto en la distrikto Frankfurt/Main, sed pro la pensiumiĝo nun necesas ŝanĝo. D-ro Lang transdonas tiun funkcion al sia posteulo, s-ro Egon Kiefer.



Dr. Wilhelm Lang
ĝisnuna



Egon Kiefer
nova
kaj
distriktkomisiito

Egon Kiefer
nova

Je tiu okazo la estraro de GEFA kaj la gekolegoj de la distrikto Frankfurt/Main esprimas sian sinceran dankon al d-ro Lang pro lia sukcesplena longjara agado. Wilhelm Lang naskiĝis en 1911 en Limburg (Lahn) kaj deĵoris dum multaj jaroj en la kontrolinstanco ĉe la fervoja direkto Frankfurt/Main. Pere de la bedaŭrinde jam mortinta s-ro Jäger li kontaktiĝis kun Esperanto en 1952. Jam en 1953 li transprenis la funkcion de komisiito por Esperanto, kiun li plenumis per imitinda fervoro dum pli ol du jardekoj. Post du ekzamenoj pri la lingva

kapableco kaj kiel kursgvidanto li transprenis en 1961 krome la oficon de ekzamenkomisaro.

Multajn kongresojn de IFEF kaj jarkunvenojn de GEFA li partoprenis. Lia aktiveco ebligis plurajn lingvajn kursojn kaj ekzamenojn, konstantan kunvenlokon kaj specialajn aranĝojn ekz. karnevalajn vesperojn aŭ la jarkunvenon de GEFA en 1970 en Darmstadt. La legantoj de la BULTENO esperas, ke d-ro Lang laboros por Esperanto ankaŭ kiel pensiulo.

La posteulo estas 20 jarojn pli juna. **Egon Kiefer** naskiĝis en 1930 en Neuendorf (Main). Liaj ĝeneralaj interesoj pri fremdaj lingvoj kondukis lin en 1953 al Esperanto. En 1954 li aliĝis kiel fervojisto al la fervojista kaj urba Esperanto-grupo de Stuttgart. Li laboris en la sociala servo ĝis 1971 ĉe la fervoja direkto Stuttgart. Multe ŝatata inter la gesamideanoj pro lia humorplena sinteno, por la amo al

muziko kaj kanto, li estis preta transpreni en 1963 la funkcion de komisiito por Esperanto en la fervoja distrikto Stuttgart. Dum tiu okjara fruktedona periodo la nombro de la GEFA-membroj en tiu distrikto kreskis de 15 al 70. GEFA kaj la gekolegoj de la distrikto Frankfurt/Main estas konvinkitaj, ke la sperta kolego Kiefer, deĵoranta deposed 4 jaroj en la Centra Komerca Servo en Frankfurt/Main, sukcesplene laboros kiel distriktkomisiito. Niaj bondeziroj akompanos lian agadon.

GEFA

Stuttgart

La fervojistaj esperantistoj el la distrikto Stuttgart aranĝis la 1-an de Marto 1975 en Ulm agrablan jarkunvenon. La distriktkomisiito Krüger povis bonvenigi proksimume 50 geamikojn de la internacia lingvo Esperanto, inter ili la lokan BSW-estron, sinjoron Männer, nian ŝatatan GEFA-sekretariinon Elfriede Kruse, la distriktkomisiiton el München, sinjoron Weidacher kaj multajn aliajn. Ludwig Pickel el Nürnberg ĉeestis kun sia librostando kaj salutis la partoprenintojn nome de GEA. Nia kolego Wilhelm Barnickel el Frankfurt/Main venis por prezenti sian sonfilmon pri la IFEF-kongreso 1974 en Tarragona. Li ricevis koran aplaŭdon por la bone verkita filmo. Nia amiko Otto Walder el Romanshorn povis, same kiel dum la jarkunveno de GEFA en Bamberg, entuziasmigi sianjn aŭskultantojn kun raporto pri vojaĝo tra Sovetunio. Ekstere de la programo, sinjoro Smolić, partopreninto de la UEA-kongreso en Hamburg, prezentis ankaŭ memverkitan filmon. Poste sekvis la amuza parto de la renkontiĝo kun ludoj kaj danco. Menciinda ankaŭ la kantprezentado de fraŭlino Braun el Laupheim je la sonoj de gitaro. Dankon al la kolegoj Jocham, Ries kaj Schimpel, kiuj faris la lokajn organizajn laborojn.

Krüger

Einweihung

der ersten Esperanto-Gaststätte in Paderborn. Im Beisein von Fernsehen und Rundfunk und zahlreicher Esperanto-Gäste wurde am 5. Februar 1975 die erste Esperanto-Gaststätte in der Bundesrepublik Deutschland eingeweiht. Es handelt sich um die Gaststätte „Tönnchen – Esperanto – Bareleto“ in Paderborn, Kasseler Straße 1. Gastwirt Roos, ein Holländer, seine Frau und Kellnerin haben in einem Schnellkurs Esperanto gelernt und werden ihre Gäste nunmehr auch auf Esperanto bedienen.

Dufoje Esperanto-kunvenoj en Bavario

München. Esperanto-grupo Munkeno kunlabore kun la distriktkomisiito por Esperanto de la Germana Fervojo, distrikto Munkeno, Josef Weidacher, organizis informkunvenon, lunde, la 20an de Januaro,

je la 18a horo, en stacidoma ekspoziciejo. Ĉeestis trideko da personoj, inter ili ĉ. 14 interesuloj. Oni montris la GEFA-ekspozicion kunmetitan de Kurt Jentsch, kaj Libroservo Pickel prezentis malgrandan libroekspozicion. Ludwig Thalmeier, Landshut, montris per lumbildoj la praktikajn uzeblecojn de Esperanto.

Nürnberg. (pp) Esperanto-centro Nürnberg invitis la E-amikojn de Nürnberg-Fürth al dimanĉ-posttagmeza kunveno en Fürth, la 2an de Februaro. Michael Zeilinger, Fürth, rakontis pri sia vojaĝo tra Japanio, kiun li faris kune kun sia familio. La montritaj lumbildoj ne prezentis la kutiman kliŝon de Japanio, sed donis perspektivan vidatan de interne. — Günter Jacob, Nürnberg, montris mallongan filmon mem faritan pri la ĝemeligaĵaj solenaĵoj en Forchheim inter la urboj Forchheim kaj la franca urbo Le Perreux, kaj Alexander Starke, Nürnberg, donis kelkajn ekzemplojn de sia deklama arto. — La kunvenon ĉeestis gastoj el Kronach.

Das Wichtigste dieser Ausgabe in Deutsch

Seiten 1+2: **Villach kiel internacia banloko** In Ergänzung zu Bulteno 1/75 bringt der Verfasser eine Darstellung über die Bedeutung des Warmbades Villach als international bekannten Badeort. Ebenfalls wird das Ziel eines Halbtagesausflugs zum Dreiländereck bei Arnoldstein und die vorgesehene „Esperanto“-Straßenbenennung behandelt.
Seite 2: **LES 1975.** Ein Bericht über die Linzer-Esperanto-Skiwoche vom 8. bis 15. 2. 1975.
Seite 3: **GEFA-jarkunveno en Treuchtlingen.** Entgegen der bisherigen Verlautbarung wird die diesjährige Jahreshauptversammlung vom 10. bis 12. Oktober in Treuchtlingen (BD München) durchgeführt. Die Zugverbindungen nach T. sind äußerst günstig, Unterkunft und Verpflegung zu angemessenen Preisen.

Redaktfino por n-ro 3/75 estas la 10. 6. 75